

IEL KAJ IOM

de C. J. ADCOCK

Mi ofte rimarkis nelogikan uzon de *iel*-vortoj kaj, do, tre ŝatis la legadon de „*Du Malsanoj en Esperanto*” de nia nederlanda samideano, s-ro de Hoog. Pri multaj punktoj mi akordas kun la genia verkisto, kaj lia klarigo pri zamenhofa uzado estas speciale bonvena, sed mi devas konfesi, ke kelkaj punktoj en liaj argumentoj influis min negative. Pro tio, ke la afero estas miaopinie tre grava, mi petas permeson revivigi malnovan disputon.

La ĉefa demando turniĝas ĉirkaŭ la uzo de „*tiel*, *kiel*” por esprimi gradon. De Hoog skribas pri la malfacilo distingi en multaj kazoj gradon de maniero kaj pri la gravo konformiĝi al la zamenhofa uzado. Mi konsentas ambaŭ punktojn, sed mi devas aserti, ke ne ĉiufoje estas neeble distingi gradon de maniero kaj, laŭ la ekzemploj, kiujn de Hoog mem provizis, Zamenhof ofte uzis oportunan formon, por indiki diferencon. Sur paĝo 107 ni trovas: „..... *tiom*, *kiom* estas necese”¹⁾ kaj sur paĝo 110 „*almenaŭ tiom*, *kiom* mi ĝin aŭdis”²⁾. Mi konsilas, do, ke ni ĉiufoje uzu la *iom*-vortojn, kiam temas pri grado. Kiam oni ne povas decidi, ĉu estas afero de grado aŭ de maniero, certe taŭgas la *iel*-vortoj.

Mia neakordiĝo kun de Hoog precipe tuŝas „*tiel*, *kiel*”. Li skribas (p. 88), ke Zamenhof ĉiufoje diris „*tiel bela*, *kiel*”, „*tiel rapide*, *kiel*”, ktp. kaj neniam uzis alian formon. Sed ne plaĉus al mi, se mi devus eviti formon, sole ĉar la Majstro neniam provis ĝin. Sufiĉas al mi, ke laŭ lia ĝenerala uzado vorto havas la bezonatan signifon. Ni nepre evitu arbitran regulon pri la uzo de vortoj. Se ni konsilas en multaj kazoj la uzon de *iom*-vortoj, por esprimi gradon, sed ne kiam temas pri komparo rilate adjektivon aŭ adverbos, nia lingvo ekiros la vojon de la naciaj lingvoj kaj baldaŭ venos la tempo, kiam lernantoj devos ŝviti super la esceptoj en nia lingvo kiel en naciaj lingvoj.³⁾

Ni memoru, ke „*tiom*” kaj „*tiel*” ne havas la saman sencon kaj ke estas necese fari elekton ĉiufoje laŭ la signifo de la frazo. Kial mi devus diri „*tiel bela*, *kiel*”, se tion mi ne celas? Prave mi dirus: „*ŝi estas tiel timema*, *kiel cervido*”, se ŝi efektive havas tian emon al timo, sed ĉu mi povus diri: „*ŝi estas tiel bela*, *kiel floro*”, kiam efektive ŝi estas bela ne en tia maniero, sed nur en tia grado? Mi povus diri: „*li estas tiel kruela*, *kiel kato*”, sed tio ne necese signifas, ke „*li estas tiom kruela*, *kiom kato*”, ĉar oni povus esti kruela en la sama grado kiel kato, sed ne en la sama maniero. La lingvo devas permesi, ke ni diferencigu unu de la alia.⁴⁾

Eble iu sperta lingvisto plene klarigos, kiel ni povus uzi la *iel*-vortojn

kaj *iom*-vortojn tute logike, sed laŭ la kutima uzado de Zamenhof. Mi kredas, ke la Majstro ne pretendus, ke li mem elĉerpis ĉiun eblan lingvan formulon.⁵⁾

Ni, do, ne kopiu senpripense literaturan kutimon, kiam tio povas iufoje limigi kaj erare prezenti tion kion ni volas esprimi. Blinde forĵetante la eblon de pli klara esprimado, ni dekliniĝas de la ĝusta vojo al la natura evoluo de nia lingvo.

Komento de S-ro H. A. de Hoog

Mi trovis la leteron de Adcock, kiun vi sendis por komentarii, nur post mia libertempo. Tiu letero estas miaopinie tre stranga, ĉar montriĝas el ĝi, ke li vere legis *Du Malsanojn* ne tre atente kaj volas remalfermi disputojn ĝuste pri la temo en sia tuteco, kiun mi tamen ĝisfunde traktis. Ĉiuj liaj demandoj trovas respondojn en „*Du Malsanoj*”. Tial mia komentario povas esti mallonga. Jen ĝi estas:

sub 1: En la frazo de pĝ. 100, n-ro 1 „*Mi ankaŭ neniel povas altranĉi tiom*, *kiom estas necese*” (Marta 108), *tiom/kiom* klare indikas *kvan-ton* kaj ne gradon.

sub 2: En ĉi tiu frazo *tiom/kiom* havas la limigan funkcion, kiun mi preparolis sur pĝ. 114 de *Du Malsanoj*. Ĉi tie do temas pri gradoprimo en speciala nuanco.

sub 3: Ĝuste por eviti tian ŝvitadon mi serĉis kaj trovis la vere ne tre komplikajn regulojn de la Zamenhofa uzado. Vidu *D.M.* pĝ. 131 k.s. Kaj legu mian paragrafon 106: La uzado de Zamenhof ne estas plena de esceptoj aŭ arbitraĵoj.

sub 4: Ĉu tiaj - pure filozofiaj - distingoj vere estas necesaj? Tre detale mi traktis pri tio en *D.M.*, speciale en la §§ 82-91. Vidu la ekzemplojn de § 89.

Se iu estas samgrade kruela kiel kato, li (ŝi) montros tion laŭ la sama maniero; almenaŭ: la manieroj laŭ kiuj la krueleco manifestiĝos, estos tiaj, ke la komparo kun la kato trudas sin al la observantoj! Alie la komparo ja ne havus sencon. Komprenoble tiuj manieroj ne povas esti identaj kun tiuj de la kato, sed tio ja estas evidenta.

sub 5: Mi sincere, kvankam modeste, kredas, ke mia „*Du Malsanoj*” estas tia traktaĵo, kian samideano Adcock deziras.

Li ne forgesu la eldiron de la Majstro: „La tuta lingvo kun ĉiuj ĝiaj nuancoj havas en mia kapo formon *tute difinitan* kaj *precizan*” (*Let. de Z. I* 73)

La uzado de *tiel/tiom* ne estas ĉe Zamenhof senpripense literatura kutimo. Tio ĝi fariĝis ĉe la aŭtoroj, kiuj ne detale konis tiun uzadon, kaj ĝuste kontraŭ tio mi verkis mian „*Du Malsanoj*”-n.

H. A. de Hoog